Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2003 numero 3-a: majo / aŭgusto

kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de majo




Foto François Randin

## Dum la Ĝenerala Jarkunveno de la 5-a de aprilo

**Ĉe la estrara tablo atente protokolas Nicole MARGOT, senmove flirtas nia flago, kun aŭtoritato prezidas Bruno GRAF, kiun serioze aŭskultas Dietrich WEIDMANN prezentonta sian novan vortaron.**

# Rememorigilo

## SES informas

### Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: claude.gacond@ne.ch & gacond@bluewin.ch

& ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29: indiki: por Claude GACOND

Redaktaj kunlaborantoj: Nancy FONTANNAZ, Andy KÜNZLI, Richard SCHNELLER.

## SES informas

### Redaktaj datlimoj

#### por la venontaj numeroj

**2003-4**: septembro-oktobro: aŭguste 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de septembro.

**2003-5**: novembro-decembro: oktobre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

**2004-1:** januaro-februaro: decembre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de januaro.

## SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen/Bern. &: 031 921 44 59. Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch.

Dietrich WEIDMANN, vicprezidanto, PF 301, 8034 Zürich. &: 01 251 50 25. Retpoŝto: info@esperanto.ch.

Nicole MARGOT, sekretario, Chemin des Lys 4, 1010 Lausanne.&: 021 653 14 67. Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.

Elisabeth LAUPER, kasisto, Chapeau Rablé 42, 2300 La Chaux-de-Fonds. &: 032 914 39 34.
Retpoŝto: elilauper@bluewin.ch.

Chiara FABBRI, peranto itallingva kaj junulara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Retpoŝto: chiara-fp@bluewin.ch.

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4
Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

## Anoncoj

| Paĝo | Neesperantistoj & komercaj | Esperantistoj & nekomercaj |
|---|---|---|
| 1/8 | CHF 40 | CHF 20 |
| ¼ | CHF 70 | CHF 35 |
| ½ | CHF 110 | CHF 55 |
| 1/1 | CHF 180 | CHF 90 |



# Svisa kalendaro

## Maje

**17:** Printempa Tago de JES.
**20:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**22:** Basel: ESB: kunveno ĉe minigolfo.
**24:** Chaux-de-Fonds: CDELI: kun Ed. Borsboom
**24-25:** Chaux-de-Fonds: KCE: Monatfino.
**29 ĝis junio 01:** Zürich: 100 jarojn bahaa religio kaj esperanto-movado en Svislando..

## Junie

**03:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**03:** Genève: La Stelo: kunveno.
**04:** Luzern: LES: kunveno.
**04:** Wil: EKW: kunveno.
**06-09:** Kaufbeuren (Germanio): 80-a Germana Esperanto-Kongreso.
**17:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**21:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
**26**: Basel: ESB: kunveno ĉe Berthe SPALINGER.

## Julie

**02:** Luzern: LES: konversacia rondo.
**02:** Wil: EKW: Promeno al Dreibrunnen.
**05-12:** Grindelwald: SAT-antaŭkongreso.
**12:** Genève: La Stelo: kunveno.
**12-19:** La Chaux-de-Fonds: 76-a SAT-Kongreso.
**19-26:** Lesjöfors: 59-a IJK.
**26 ĝis 02 aŭg.:** Göteborg: 88-a UK.

## Aŭguste

**09:** Luzern: LES: ekskurso.
**10:** Wil: EKW: Ekskurso al Bergli Fuchsacker.
**16:** Genève: La Stelo: kunveno.
**24:** Basel: ESB: ekskurso.

## Septembre

**02:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**03:** Luzern: LES: konversacia rondo.
**03:** Wil: EKW: kunveno.
**16:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**25:** Basel: ESB: kunveno.
**26 ĝis 2 oktobro: Kultura Jubilea Internacia Semajno (KJIS)**: Chaux-de-Fonds: Alvena tago.
**27: KJIS**: Lausanne-Rolle: **Centjara jubileo de la fondo de SES** kaj komenco de la jubilea jaro.
**28-29**: **KJIS**: Chaux-de-Fonds: CDELI: renkonto kun Claude Piron, rememoro pri Edmond Privat
**30**: **KJIS**: Ekskursa tago.

## Oktobre

**01: KJIS**: Les Brenets: rememoro pri Edouard Ducommun kun Mireille Grosjean kaj sro Léglise.
**01:** Luzern: LES: kunveno.
**01:** Wil: EKW: kunveno.
**02: KJIS**: Chaux-de-Fonds: Konkluda tago.
**21:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**23:** Basel: ESB: kunveno ĉe fam. Focke-Béroud.
**25:** Ĝenerala Asembleo de JES.

## Novembre

**04:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**05:** Luzern: LES: konversacia rondo.
**05:** Wil: EKW: kunveno.
**15:** Rotkreuz: SAEF: 41-a GERI.
**25:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**27:** Basel: ESB: kunveno.

## Decembre

**03:** Luzern: LES: Zamenhofa festo.
**03:** Wil: EKW: Adventa vespero.
**09:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**27 ĝis 3 jan.**: Kiel: 20-a IFJ.

## 2004 Januare

**07:** Luzern: LES: Konversacia rondo.

# Tutsvisa kultura renkonto
# kun Ed BORSBOOM

prezidanto de IEI kaj aŭtoro de la ĵus aperinta libro *Vivo de Andreo Cseh.*

CDELI ĉe Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

**sabaton 24-an de majo**

# Pri la sekreta vivo de Andreo CSEH

**Detelaj informoj pri tiu ĉi renkonto legeblas ĉe la rubriko pri CDELI sur la paĝoj 19-20-aj.**

Renkonto kun Ed BORSBOOM, nederlanda pedagogo kaj preleganto humurplena, estas ĉiam neforgesebla evento, tial ni vigle instigas al nepra partopreno al tiu ĉi okazaĵo, kiu ankaŭ donos la eblon konatiĝi kun la eksterordinara personeco de la esperanto-pioniro Andreo CSEH.

Pro tio, ke verŝajne pluraj partoprenontoj ne konas la aventur-riĉan vivon de Andreo CSEH, Ed BORSBOOM kronologie rakontos ĝin dum la unuaj du lekcioj. Dum la tria li priparolos kvar-kvin problemojn rilate al la verkado de la *Vivo de Andreo Cseh*, ekzemple: ĉu oni povas priskribi la fi-agon de iu esperantisto? En la lasta lekscio li tuŝos la lingvaĵon mem de la biografio, ekzemple la iom abundan enmeton de zamenhofaj proverboj. Dum ĉiuj lekscioj vivoplenaj ni komune laŭtlegos kelkajn koncernajn tekstojn.

Depost 1995 Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago havas novan estraron, en kiu Ed BORSBOOM partoprenas kiel prezidanto. IEI aktivas nun sur tri terenoj: instruo, eldonado kaj libro-vendo. La plej grava estas la unua: la prizorgo de la Ĉe-metoda instruado tra la mondo. La realigon prizorgas Atilio ORELLANA, la direktoro de la haga IEI-kontoro. Li gvidas kursojn de esperanto kaj seminariojn por formi Ĉe-instruistojn. Helpas lin pluraj aktivaj Ĉe-instruistoj, inter kiuj ankaŭ Ed BORSBOOM mem. Ekzemple dum la UK en Gotenburgo Atilio ORELLANA gvidos la Ĉe-seminarion kaj Ed BORSBOOM la Ĉe-kurson.

En la venonta septembro ĉe Kvinpetalo en Bouresse Ed BORSBOOM gvidos stud-semajnon, dum kiu la temo estos la vivo de Andreo CSEH kaj liaj didaktiko kaj pedagogio.

Vidu la hejmpaĝon de IEI: TTT http: www.iei.nl.

Vivo de SES

# Protokolo
## de la Ĝenerala Kunveno

Basel, sabaton 5-an de aprilo, 14h00-16h00



Foto François Randin

30 voĉrajtaj personoj ĉeestas la kunvenon kun gastoj el Germanio kaj Francio.


**1. Komunikoj de la prezidanto.**

La prezidanto Bruno GRAF dankas al Nicole BEROUD kaj al la bazela grupo por la organizo de tiu aranĝo. Li prezentas la estraron:

Prezidanto: Bruno GRAF.
Vicprezidanto kaj reprezentanto de Alemanio: Dietrich WEIDMANN.
Kasisto: Elisabeth LAUPER.
Sekretario kaj reprezentanto de Romandio: Nicole MARGOT.
Reprezentanto de itallingva Svislando: Chiara FABBRI.

Senkulpiĝis Elisabeth LAUPER (kiu revenas samtage el vojaĝo), Chiara FABBRI, Gabriel CHAVES, Alain FAVRE, Margrit GULDIN, Richard SCHNELLER, Leonie SENNHAUSER, Arlette DI VETTA, Nelida WEIDMANN.

Ni observas unuminutan silenton honore al la membroj, kiuj forpasis dum la jaro: Ines HUNKELER, Hans HERRMANN-LUGINBÜHL (la magiisto Hoho), Angelo MELLINI (eks-sekretario de SES), Carla MÜLLER, D-ro Alfred WENGER.


Foto André Grossmann

**2. Elektoj de la voĉnombrantoj:** Paul SCHERER, Jean-Thierry VON BÜREN, François RANDIN.

**3. Protokolo de la lastjara Ĝenerala Kunveno:** Unuanime akceptita.

**4. Jarkalkulo kaj bilanco kun raporto de la kaskontrolantoj:**

Anstataŭante la kasistinon Bruno GRAF komentas la librotenadon. Ni konstatas gajnon de CHF 1000. La celo de la societo kompreneble ne estas ŝpari. Ni buĝetas CHF 4000.- por informado kaj ni pretas subvencii ĉiun proponon, la membroj kaj la societoj ne hezitu prezenti siajn projektojn al la komitato, ili estas bonvenaj. Ni ŝparas administrajn kostojn danke al la per-reta kunlaboro de la estraro kaj al la sensalajra bonvolema laboro de la redaktoro de *SES-Informas*, Claude GACOND. Ni dankas niajn membrojn pro ties donacemo, invitas ilin iĝi "patronoj" laŭ la nova membro-kategorio enkondukita lastjare. Rilate la bilancon ni konstatas, ke nun granda parto de nia kapitalo kuŝas ĉe Wir-banko kaj tiel produktas pli da interezoj.

La jarkalkulo kaj bilanco estas unu-anime akceptitaj kaj la estraro malŝarĝ-ita.

**5. Agado 2003 kaj buĝeto:**

De la 29-a de majo ĝis la 1-a de junio okazos bahaa jubilea kunveno esperanta en Zürich, kie la partopren-antoj havos la eblon studi komunajn trajtojn en la pasinteco de la asocioj ne nur per prelegoj, sed ankaŭ per seminarioj. Aliĝilo jam aperis.

Meze de julio la SAT-kongreso estos organizita de KCE en La Chaux-de-Fonds. Ni ĝin mencias, kvankam SES ne partoprenas al ĝia organizo. La

programo aperis en *Sennaciulo* kaj en *Heroldo de Esperanto*.

En septembro nia jubilea festo komenciĝos laŭ la programo aperinta en *SES-Informas* kaj daŭros unu jaron. Claude GACOND komentarias tiun eventon, kaj cirkuligas proponojn de "logoj" por la jubileo, kiujn projektis Benno FRAUCHIGER, por ke ĉiu esprimu sian opinion.



Foto André Grossmann

Atentaj kunsidantoj.

La jubileo komenciĝos en Rolle, kie naskiĝis Svisa-Esperanto-Societo, kiu apudas la vilaĝon Gland, kie vivis kaj vivas du gravaj esperantistaj verkistoj: Edmond PRIVAT kaj Claude PIRON. Ĉar en tiu regiono malfacilas trovi loĝlokon mezkostan, ni tien nur unutage ekskursos, kaj la semajno pludaŭros en La Chaux-de-Fonds kun prelegoj de Claude PIRON kaj rememorigo pri Edmond PRIVAT, vizito al la lernejo la "Grande Ourse", ekskurso en Les Brenets, kie la vilaĝhistoriisto parolos pri la pioniro Edouard DUCOMMUN.

Al Rolle ni vojaĝos ŝipe el Lausanne, kie espereble la urbestro kontaktita de François RANDIN akceptos nin (li eble eĉ vojaĝos ŝipe kun ni). Espereble ni estos tiel multaj, ke ni invados la ŝipon, kie ni rezervis por ni la supran etaĝon de la unua-klasa restoracio. En Rolle ni vizitos ekspozicion pri la naskiĝo de SES arangôta en montrofenestroj de vendejoj.

La jubilea jaro finiĝos la 27-an de septembro 2004 kun la apero de la *Svisa Enciklopedio pri esperanto kaj interlingvistiko* verkata de Andy KÜNZLI.

La Romanda Radio ŝatus festi la jubileon per serio da elsendoj pri la gravaj esperantistoj de Svislando, kaj forumo pri lingva demokrateco devus okazi en februaro 2004. Tiuj aranĝoj plu planiĝas per kontakto kun respons-uloj. Ni dankas Mireille GROSJEAN, kies regula informado al ĵurnalistoj helpas tiujn kontaktojn.

Mireille GROSJEAN kunordigas nian ĉeeston en la Svisa Socia Forumo, kie oni interesiĝas pri nia lingvo, kaj kie ni povas tutlibere agi en respekto kun nia politika neŭtraleco, ĉar ne ekzistas aliĝo kaj statuto en tiu forumo, kiu batalas por justa tutmondiĝo. Ni havos standon en la friburga kunveno de la 20-a kaj 21-a de septembro. Kunlaborantoj estas kore invititaj.

Bruno GRAF rimarkas, ke tiu forumo havas politikan celon kaj demandas la opinion de la asembleo pri tio. Nicole MARGOT rimarkigas, ke nia neŭtraleco asociiĝas al respekto de la Homaj Rajtoj, al kiuj ni povus aldoni la Deklaracion pri la Lingvaj Rajtoj, kaj ke tiuj du Deklaracioj sufiĉas por permesi al svisaj esperantistoj kunigi siajn fortojn por mondo home kaj kulture pli justa sen eniri ideologion de iu ajn politika partio. La esperantistoj

jam ĉeestis en la unuaj similaj forumoj en Brazilo. La asembleo unuanime ĝojas pri la ĉeesto en la Socia Svisa Forumo.

Propono de Junularo Esperanta Svislanda: Dissendi kune kun *SES-Informas* la bultenon de JES al ĉiuj membroj kaj interesatoj. Tio estas plej bona eblo por subteni JES-on kaj junigi nian anaron. La estraro decidis transpreni la kostojn de CHF 800.-, ĉar por JES estus tro granda ŝarĝo. Lastjare la redaktoro de *SES-Informas* jam aldonis la JES-bultenon, sen ke JES petis subtenon.

**6. Buĝeto:**

En la buĝeto ni povas konstati, ke CHF 5000.- estas proponitaj por renovigo de koresponda kurso por la germanlingvanoj. Claude GACOND, kiu reverkas la francan korespondan kurson komentas: La renaskita koresponda kurso por franclingvanoj refunkcias danke al Nancy FONTANNAZ, kiu laboras po unu tagon semajne korektante la ricevitajn taskojn. La germanlingva kurso jam ekzistas verkita de Herbert MAYER. Ĝi paneis pro manko de laborkapabloj. SES pretas elspezi CHF 5000.- por ĝia modernigo kaj por aldoni beletran parton. Tomasz CHMIELIK laboros al tio. Venis esprimo de intereso el Aŭstrio kaj el Germanio. Ni serĉas kompetentan kunlaboranton por la korekto de la respondfolioj.

Ursula NIESERT, afergvidanto de GEA ĝojas aŭdi, ke tiu kurso estas sur bona vojo. Ĉar la kurso nun uzata en Germanio tre baldaŭ elĉerpiĝos, la germanaj esperantistoj do havos la okazon kunlabori.

La buĝeto estas unuanime akceptita.



Foto François Randin

Nancy FONTANNAZ kaj Claude GACOND.

**7. Reelekto de la estraro kaj kaskontrolantoj:**

Mireille GROSJEAN estas petita gvidi tiun tagorderon.

Por ke estu kontinueco dum la jubilea jaro la estraro reprezentas sin bloke kaj estas reelektita unuanime.

Same la kaskontrolantoj, Christiane SIXTUS POT kaj Dieter ROOKE pretas plu funkcii kaj estas unuanime reelektitaj.

**8. Elekto de honora membro:** Delonge SES ne plu elektis honorajn membrojn. La estraro proponas kiel honoran membron Claude GACOND, kiu festas tiun ĉi jaron sian 50-jariĝon de esperantista vivo. Li estas elektita per entuziasma aplaŭdo. Bruno GRAF, prezidinto de Svisa Esperanto-Junularo antaŭ 50 jaroj memoras, kiam li petis Claude GACOND eniri la tiaman estraron de la junularo. Ankaŭ Claude bone memoras pri tio kaj rakontas, ke li tiam estis komencanto kaj partoprenis sian unuan Ĝeneralan Kunvenon, kaj ankoraŭ ne ĉion komprenis.

Li multe atentis por aŭskulti la paroladon de Edmond PRIVAT kaj, laca, kiam oni proponis lin kiel sekretarion, li jesis sen kompreni la proponon. Tiu "miskompreno" certe orientis lian vivon alimaniere, ol li celis, por la bono de esperanto en Svislando! Li estis helpita de "sia amikino" Andrée GIROUD, kiu kunlaboris kaj poste akceptis foje vivi kun malpli da mono, kiam ŝia edzo pormomente forlasis la profesian vivon por komplete dediĉi sin al esperantujo. Nia dankemo iru al ili ambaŭ.

**9. Diversaĵoj:**

André GROSSMANN donas novaĵojn pri la societo de Mulhouse, kie okazas kursoj por komencantoj kaj progresantoj dufoje semajne kaj kiu eldonas la bultenon: *Sud-Rejna Kuriero* kunlabore kun la Bazela Grupo.

Mireille GROSJEAN parolas pri sia regula informado al franclingvaj gazetoj. Ŝi pretigas tutmondan regularon de ekzameno kun ILEI laŭ peto de UNESKO.

Mireille GROSJEAN ankaŭ informas pri pinta konferenco kun ŝtatestroj kaj ministroj pri informado, kiu okazos en Genève inter la 10-a kaj la 12-a de decembro 2003, kadre de Unuiĝintaj Nacioj. Tiu konferenco pri komunikado havos kiel temon: "Ligu la neligitajn", tio estas: ni konektu al la reto la personojn el la tria mondo pere de materialo por faciligi cirkuladon de la informado. UEA klopodas oficiale partopreni la konferencon. Kvankam tiu temo ne havas rektan ligon kun esperanto, ĝi tamen koncernas mondan komunikadon kaj nia lingvo estas aparte aktiva sur la reto kaj Mireille proponas, ke la esperantistoj demonstru en la stratoj de Genève. Ŝi pretas organizi la manifestacion kaj informi esperantistojn ekster Svislando. Multaj manoj leviĝas en la Asembleo por subteni tiun ideon per intenco rekte partopreni.

Christiane SIXTUS POT informas pri la peto de Arlette DI VETTA koncerne al la strukturoj kaj la rilatoj inter la diversaj asocioj en Svislando.

Dietrich WEIDMANN respondas, ke ĉiuj estas sendependaj kaj memstaraj. Rilatoj ekzistas inter SES kaj KCE. SES transdonis al KCE la taskon funkciigi ekzamenojn. La arkivo de SES kaj de aliaj societoj iras al CDELI. Dietrich proponas skribe priskribi tiujn strukturojn sur sia perreta informpaĝo. Dietrich WEIDMANN prezentas novan vortaron eldonitan kaj verkitan de li mem: *Deutsch-Esperanto, Esperanto-Deutsch*, eld. Mondo Servo. Formato A5, 168 paĝoj, prezo CHF 39.

La kunveno finiĝis ĉirkaŭ la 16-a horo.

Protokolis Nicole MARGOT

-oOo-

# Kultura Trilanda Renkontiĝo
## prepare al la centjara jubileo de SES

La jarkunveno de SES disvolviĝis kadre de **Kultura Trilanda Renkontiĝo semajnfina**, pri kiu raportas la aprila numero de la komuna bulteno *Sud-Rejna Kuriero* de Esperanto-Societo Basel kaj de Mulhouse-Esperanto. Jen ni citas erojn el tiu raporto:

### Pri la sabata programo




Foto François Randin
Benno FRAUCHIGER inter Didi Weidmann kaj Laurent.

Esperanto-Societo Basel organizis tiun gravan eventon, kiu okazis la 5-an de aprilo en la kunvenejo de la evangelia metodista eklezio Riehenring 129. La programo komenciĝis per la Fervojista Jarkunveno. Poste okazis la Rendevuo de aktivuloj, kiun partoprenis trideko da personoj: Benno FRAUCHIGER, prezidanto de JES, parolis pri sia esperanta vivo kaj Ursula NIESERT, sekretariino de GEA, atentigis pri la diversaj fazoj de "Esperanto-kariero", de komencanto ĝis plenkreskulo.

Dum paŭzo antaŭ la tagmanĝo, ĉiuj partoprenantoj estis kore invititaj al aperitivo. Ĝi estis ankaŭ agrabla momento por interkonatiĝo. Dume pretiĝis la tabloj por ege bongusta tagmanĝo, kiu okazis en la sama ejo.




Foto André Grossmann
Andrée GACOND rejuniĝemas por aniĝi en JES!

Je la 14a horo okazis la Ĝenerala Kunveno de SES, kiun tre efike gvidis sinjoro Bruno GRAF, prezidanto de SES.

Post kafo-paŭzo venis tamburistoj el la bazela Kliko "Giftschnaigge", kiuj laŭte sed tre bazelece malfermis la fest-

adon **"Ekal la 100-jara Jubileo de SES"**.

Agrable rakontante Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI parolis pri la komenco de la esperanto-movado en Svislando. Estis vere ege interese aŭdi pri konataj nomoj, kiel PRIVAT, HODLER aŭ DE SAUSSURE, sed ankaŭ pri NAVILLE, BOVET kaj aliaj…

Refoje nia kuiristino, Suzanne JUFERT, gastigis nin per bonega salat-bufedo kaj "Tiramisu".

Post la manĝo pluraj devis forkuri al trajnoj kaj la cetero de la partopren-antoj sub la gvidado de Frank UBIK kaj André GROSSMANN multe ridis ludante diversajn amuzajn ludojn.

Ni dankas al ĉiuj, kiuj partoprenis la aranĝon kaj kontribuis al la bonega etoso de tiu belega tago.

Kiam mi pensas, ke ni preskaŭ nul-igis la kulturan aranĝon pro manko de aliĝoj ĉe la aliĝ-limdato(!), estintus vere domaĝe!

Nicole BEROUD.

## Pri la dimanĉa programo

Malgraŭ la oficiala nuligo de la dimanĉa programo, restis ankoraŭ kelkaj partoprenantoj, kiuj volonte akceptis viziti la urbon Basel kaj la BEYELER-Muzeon.



Foto André Grossmann

La dimanĉa grupo.

Annelies FIECHTER prizorgis la gvidadon tra la urbo kaj Nicole BEROUD improvize organizis la posttagmezan viziton al la muzeo. Nia grupeto unue manĝis en la preĝeja restoracio de Inzlingen, la loĝ-vilaĝo de Nicole. Post promeneto al ĝia akvokastelo ni veturis al la impona BEYELER-Muzeo. Ĝi prezentas sur du etaĝoj multajn pentraĵojn de la impresionisma periodo de famkonataj pentristoj: PICASSO, GAUGUIN, VAN GOGH, MATISSE, GOYA, ktp.

Tiel finiĝis por la lastaj partoprenantoj tiu agrabla renkontiĝo en Basel. Koran dankon al la organizantoj.

André GROSSMANN

# Donacoj

Donacoj en Frankoj al SES: Traugott Rinaldo AEBI, Ittigen: 10; David BUHLMANN, Prilly: 30; Suzanne CROISIER, Gimel: 20; Andrée & Claude GACOND, La Chaux-de-Fonds: 100; Jean-Loup GAUDIN, Ferney-Voltaire (FR): 15; Walter GIANNINI, Zollikerberg: 100; Marguerite JAYET, Morges: 15; PARZIVAL, Biel: 5; Jimmy RIVIERE, Prilly: 15; Tarzicia VISY, Zürich: 20; Sume: 330.

Donacoj en Frankoj por la "Agado 2003": Lucerna Esperanto-Societo: 300; Lucienne DOVAT, Renens: 65; Georgette GAUSSEN, Château-d'Oex: 100; Marguerite JACCARD-BESSON, Rolle: 65; André SANDOZ, La Chaux-de-Fonds: 50; Heinz W. STRASSER, Feldmeilen: 35; Joëlle VUILLEMIN, Genève: 25; Henri WETTSTEIN, Versoix: 100; Sume: 740.

Nome de SES la kasistino Elisabeth LAUPER kaj la redaktoro Claude GACOND dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco.

-oOo-

# Historio de la Esperanto-movado en Bazelo

Kiam okaze de la jarkunveno de SES en Basel Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI rakontis pri la komencoj de SES kaj de la svisa esperanto-movado, bedaŭrinde ne plu restis tempo al ambaŭ por prezenti la historion de Bazela Esperanto-Societo mem.

Andy KÜNZLI intertempe verkis la tekston, kiu estas antaŭvidita por publikigo en la *Svisa planlingva enciklopedio*, surbaze de la fontoj *Svisa Espero, Svisa Esperanto-Revuo, SES informas* kaj *Kuriero de Esperanto*, kun aldono de la rezulto el la enketo ĉe la e-istoj, kiun Andy KÜNZLI siatempe realigis.

Post la ĉijara kunveno, Erna DÖRING afable sendis al Andy KÜNZLI interesan kaj utilan broŝuron el la jaro 1980, kiu estis eldonita okaze de la 75-jariĝo de

Esperanto-Societo Basel kaj kiu resumas la historian evoluon de la bazela movadeto esperantista. Do, Andy KÜNZLI ankoraŭ povis konsideri tiun ĉi fonton por redakti la ĉi-sekvan tekston. Li estos kontenta kaj dankema ricevi eventualajn aldonojn, precizigojn aŭ korektojn far aliaj (bazelaj) esperantistoj, ĉar li konscias, ke tia teksto neniam povos esti tute kompleta kaj bedaŭrinde ankaŭ ne eblas mencii ĉiujn personojn, kiuj iel kontribuis al la societo. Do, la koncernan tekston li preparis por aperigo en *SES informas.*

La redaktoro.

**Mallongigoj:**

e-aĵo = esperantaĵo
EG = Esperanto-Grupo
e-ista = esperantista
e-isto = esperantisto
EK = Esperanto-Klubo
Eo = Esperanto
ES = Esperanto-Societo
UK = Universala Kongreso de Eo
*SE = Svisa Espero*

# Bazelo

La unua bazela Eo-adepto laŭ la nomaro de SES *(SE 1/1903)* estis Hans BREUNER-EGLINGER. La postaj nomaroj mencias la apotekiston H. EISENHUT kaj la gimnazianon Fritz WENK (*SE* 4/1904), frato de Eduard WENK (1890-1922), familio ĉe St. Albananlage. En 1904, la knaboj WENK starigis kun sia amiko Alfred BADER (1889-1968), kiu tiam havis dekkvin jarojn, la bazelan EKn. Post tio ili venigis al Bazelo la tiaman prezidanton de SES, la legendecan protestantan pastoron Friedrich SCHNEEBERGER (1875-1926) el la proksima urbeto Laufen, kiu cetere havis bonajn rilatojn kun la familio WENK. En 1905, Eduard WENK fondis kun Alfred BADER, la ĉefa motoro de la bazela Eo-movadeto, la bazelan Eo-Grupon, al kiu aliĝis 28 personoj (en 1905/06 la EG havis 41 membrojn). Kiel gastoj ĉeestis d-ro Alexander BLUMENTHAL el Pinsk (Rusio), la frato de la konata Eo-verkisto Leo BELMONT (A. BLUMENTHAL) el Varsovio, kaj d-ro DRAGOUMIS el Ateno. Ok tagojn post la formala fondo de la Eo-Societo, la 15-an de novembro, okazis la unua societa kunveno, en kiu oni aprobis la regularon kaj elektis la unuan estraron, kiu konsistis el prezidanto Fritz WENK jr., onta d-ro kaj sekretario de la bazelurba departemento pri edukado, kiel prezidanto, sekretario Alfred BADER, kiu fariĝos okulkuracisto, kaj instruisto LEHNER kiel kasisto. Salutkarto estis sendita al L.L. Zamenhof, kiu tuj respondis afable - ŝajne ankaŭ poste disvolviĝis korespondado kun la majstro en fora Varsovio. Favoraj artikoloj pri tiuj eventoj aperis en la bazela urba gazetaro *(Nationalzeitung* kaj *Basler Volksblatt).* Malgraŭ tiuj ĝojigaj okazaĵoj la propagando de Eo montriĝis malfacila. Ĉefe en lernejoj, iuj instruistoj, supozeble fanatikaj adeptoj de la klasikaj lingvoj, ne hezitis moki pri la nova planlingvo kaj en iuj kazoj eĉ malpermesis al la gelernantoj viziti Eo-kursojn. En Eo-medioj, la diskutojn de la jaro 1906 dominis la el-

dono de la dramo *Wilhelm Tell* de F. V. SCHILLER, en Eo-traduko de la munkenano L.E. MEIER kaj eldonita de SES. En 1907 estis malfermita Eo-konsulejo en Bazelo (Centralbahnhof-strasse 5). La societon vizitadis la e-istino Lina HÄBERLI (poste GRÜTTER), kiu en 1892 naskiĝis en Berno, partoprenis la UK-n en Berno en 1913, kie ŝi konatiĝis kun L.L. ZAMENHOF, poste vivis longe en Grizono kaj mortis en 1987 en St. Gallen. Ĉi tiu sukcesa komenca periodo daŭris ĝis 1908, kiam ekfuroris la reformlingvo Ido, kiu absorbis ankaŭ pastron SCHNEEBERGER kaj la fratojn WENK. En 1910 Eduard fondis la bazelan Ido-grupon (Mond-linguala Societo) kaj prezidis la asocion Suisana Uniono por la propagado di la linguo internaciona (1912). Al Eo restis fidela Alfred BADER, kiu montriĝis tre furioza pri SCHNEEBERGER en Laufen, Anton WALTISBÜHL en Zuriko kaj RENÉ DE SAUSSURE en Ĝenevo, kiuj fordonis tiom da energio kaj mono por la nova projekto. En 1909 profesoro CHRISTALLER el Stuttgart prelegis en la safrana gildo de Bazelo pri la historio de la internacia lingvo, kaj unu jaron poste la fama kemiisto kaj nobel-premiito (1909) Wilhelm OSTWALD el Leipzig impresis la ĉeestantojn per prelego pri la internacia lingvo.

En 1911, la ruinon de la disfalinta bazela Eo-movado kunbalais s-ro H. RUSTERHOLZ kaj f-ino Charlotte PULVER. La 15-an de februaro 1911 okazis propaganda parolado de Jakob SCHMID el Berno en Rebleuten-gildo, kiun partoprenis 80-100 personoj, ankaŭ SCHNEEBERGER kaj aliaj idistoj, kiuj diskutis inter si. Malgraŭ tiu propaganda klopodo en 1912 troviĝis nur 6-8 membroj, kiuj kunvenis sine de la bazela ES. En 1914 Eduard WENK proklamis antaŭ 60 aŭskultantoj sian revenon al Eo. Dum la milito, la ES nombris 16-17 anojn kaj 3 izolulojn.

En 1919 dank' al la klopodoj de Friedrich UHLMANN, kiu ekloĝis en Bazelo, la Eo-movado iom revekiĝis. En marto Immanuel OLŜVANGER gvidis kurson kun 50 personoj, kaj en majo la bazelanoj organizis la jar-kunvenon de SES. Samtempe okazis en la urbo la Svisa Specimena Foiro, kadre de kiu la bazelanoj starigis standon. Ĉi tion sekvis sukcesa societa kunveno kun 200 partoprenantoj kaj kun UHLMANN kaj SCHMID kiel prelegantoj. En alia kunveno SCHMID, kiu ĵus fondis komercan societon por enkonduko de la lingvo internacia, diskutis kun s-roj PEDRAZZINI kaj WAILBACHER la starigon de akcia societo por propagandi Eo-n en Svislando. Ĉi tiu propono estis akceptita kaj oni cirkuligis liston por subskribo de akcioj de po dudek frankoj. La kostoj por tiuj aranĝoj superis 1'000 tiamajn frankojn, enorman sumon, kiun la nekonataj sponsoroj pretis investi. La revuo *Esperanto* de UEA, n-ro 6/1922 raportis, ke la Svisa Specimena Foiro korespondas en Eo.

Post la fino de siaj studoj, BADER forlasis Bazelon kaj revenis nur en 1929. Intertempe H. RUSTERHOLZ, kiu transprenis la prezidon en 1909, gvidis la societon.

En la 20-aj jaroj Eo-n lernis Hermann SCHMUTZ kaj lia onta edzino Jeanne SAENGER, kiuj vaste uzadis Eo-n por siaj vojaĝoj kaj kontaktoj kun la de ili preferata fervojista medio (SAEF). En tiu tempo, verŝajne 1926, iu s-ro DEUTSCHLE instruis Eon, ĝuste ankaŭ al SCHMUTZ kaj SAENGER kaj al 12-15 aliaj, inter alie Nerina GESAGA, kiu tiam vojaĝis al Moskvo pere de Eo por partopreni sportan aranĝon kaj renkonti sian Eo-korespondanton. Kun ili estis fondita la Laborista Grupo E-ista. Ĉi tiu grupo ŝajne funkciis ĝis 1939, ĝis la komenco de la mond-milito. Tiam la membroj de la grupo timis, ke HITLER povus okupi Bazelon kaj persekuti la laboristajn e-istojn. Pro tio oni decidis kaŝi la Eo-libraron kaj aliajn e-aĵojn ĉe la subtegmentejo de la familia domo de ges-roj SCHMUTZ en Allschwil. La bela flago de la laborista grupo, manfarita de profesia tajloro, estas konservita ĝis la hodiaŭa tago. Post la dua mondmilito la laborista grupo ne plu estis reorganizita. La biografio de la paro SCHMUTZ estas sufiĉe interesa: Hermann SCHMUTZ (1896-1993), en sia junaĝo laboris en bienoj en Seeland (berna kantono) kaj en Romandio. Lin allogis la ideoj de LENIN kaj de la komuna posedaĵo, tamen la realeco sub STALIN kaj HITLER seniluziigis lin. En la 20-aj jaroj li starigis komercon pri manĝiloj, kuiriloj kaj tranĉakrigiloj kaj translok-iĝis al Allschwil/BL. Unu el liaj ŝat-okupoj estis la naturkuracado, kaj li mem produktis oleon kaj ungventon. Ĝis en sia alta aĝo li posedis bonegan vidkapablon, propradire dank' al la ĉina masaĝo, kiun li lernis praktiki per la revuo *El Popola Ĉinio* kaj kiun li regule aplikis. La familio de lia edzino, Jeanne SAENGER (1895-1982), devenis el germana Vestfalio, kie ŝia patrino kunlaboris kun la fama social-demokrato August BEBEL (1840-1913). Sekve al la kontraŭ-social-demokrata leĝo de regestro VILHELMO de la 21-a de oktobro 1878, la patro devis forlasi Vestfalion kaj ekloĝis en Montreux/VD, kie li malfermis horloĝan kaj bijuterian vendejon. Ekde 1925 la familio SCHMUTZ loĝis en Allschwil. Ankaŭ ilia sola filo Marcel lernis Eo-n (1939).

André SCHILD (1910-81) anoncis la refondan kunvenon de la bazela ES la 10-an de aprilo 1937. Sed pli kaj pli sentante sin altirata de la naturalisma skolo, SCHILD aliĝis al la lingvo Occidental-Interlingue. Post kiam en 1947 li publikigis sian propran plan-lingvan projekton "Neo-Latino", en 1951 li definitive transiris al Interlingua (IALA).

Post mallonga prezido de Samuel LEUENBERGER, la grupo estis trans-prenita de Alfred BADER, kaj kun la ĉeesto de ges-roj SCHMUTZ, komenc-iĝis trankvila kaj stabila periodo. Plej grava aranĝo de tiu tempo estis ĝenerala jarkunveno de SES okazinta en Bazelo kun 90 partoprenantoj (1952).

Nova vento ekblovis en Bazelo, kiam fine de la 50-aj jaroj aperis la juna anglo John CATLING, kiu laboris en la urbo kiel oficisto kaj kiu estis vigla, entreprenema junulo. Li edziĝis membron de la grupo, la junan lucern-

aninon Sonja BRUN. Kune la du samideanoj organizis en 1962 la 75-an jubileon de la lingvo Eo, lige kun la SES-tagoj. CATLING ankaŭ komencis gvidi kursojn, tamen neniu el la lernintoj restis longe en la grupo. Kiam familio CATLING translokiĝis al Anglio, BADER petis Kurt SCHWEIZER, instruisto en Bazelo, kiu mem lernis Eon, transpreni la prezidon – tion en aŭtuno 1962 SCHWEIZER akceptis. SCHWEIZER, sub kiu estis akceptita nova statuto, disponis muzikan talenton kaj volonte distris la grupanojn per mem tradukitaj popolkantoj kaj instruis Eon, eĉ se estis nur malmultaj partoprenantoj. El liaj lernintoj restis dum jaroj en la grupo Heinrich RINGLI, Franz LANG, J. WEIBEL kaj ges-roj SÜTTERLIN. La plej sukcesa aranĝo dum la periodo de Kurt SCHWEIZER estis la Trilanda Renkontiĝo en la jaro 1966. El Svislando, Francio, Germanio kaj Aŭstrio unuiĝis pli ol 100 gesamideanoj, kun ŝipa veturo sur la rivero Rejno kaj komuna dancludo en la restoracio "Brauner Mutz". Pro translokiĝo al Ettingen, SCHWEIZER, kiu sukcesis konstrui grupon kun 26 membroj, pludonis la prezidan torĉon en 1969 al Heinrich RINGLI (1903-1994). RINGLI klopodis okazigi interesajn prelegojn fare de konataj e-istoj kiel William PERRENOUD, August BRAUN, Mirko MAMUZICH. Ĉiujare en somero, la grupo ekskursis al la lago de Neuchâtel, kie ges-roj SÜTTERLIN posedis ferian domon. Lingvokursojn gvidis Erna DÖRING kaj s-ro *Lang*. Por efike praktiki la lingvon, DÖRING enkondukis liberajn kunvenojn kaj invitis en 1974 la nederlandan e-iston Ed BORSBOOM por prezenti la vivon de Eŭgeno LANTI, fondinto de SAT. Kiam RINGLI, kiu cetere estis protokolisto por LKK de la 64-a UK en Lucerno en 1979, verkinto de jubilea broŝuro okaze de la 75-jariĝo de la bazela EG/ES en 1980, kaj kiu restas ankaŭ en la memoro, ĉar li multe interesiĝis pri la t.n. ig-iĝ-problemo kaj tial kelkfoje ridigis siajn proksimulojn, demisiis, en 1976 estis elektita Erna DÖRING (*1920), la plej vigla membro, kiel nova prezidantino de la bazela ES. Aktiva ankaŭ en aliaj medioj kiel TANEF kiel ĝia internacia fakreferantino kaj administrantino de *La Migranto* kaj kiel svisa gazetperantino de *Sennaciulo*, DÖRING esence kontribuis al la solidiĝo de la Eo-movado en sia urbo Bazelo, ĝis 1989 prezidante la bazelan ES-n, instruante Eo-n, en 1981 fondante kaj ĝis 1989 redaktante la kluban organon *Kuriero de Eo*. Sindone ŝi organizis multajn Eo-aranĝojn, lokajn, naciajn kaj internaciajn, naturamikajn kaj plurajn trilandajn renkontiĝojn. Kulminoj de ŝia organiza aktiveco estis la SAT-kongreso en Bazelo (1981) kaj la 64-a UK en Lucerno en 1979, kie ŝi laboris kiel LKK-sekretariino, responsa pri la giĉetoj. En 1987, kunlabore kun *KCE*, DÖRING aranĝis ekspozicion pri Eo en la bazela universitata biblioteko. Post la retiriĝo de DÖRING fine de la 80-aj jaroj, nova gvidantino fariĝis Nicole BEROUD-FOCKE (*1953), magistrino de la munkena universitato (ŝtatekzameno en 1979), iama gimnazia

instruistino en Zuriko kaj Münchenstein/BL, instruistino por plenkreskuloj kaj animistino de infanoj kaj gejunuloj. Ŝi lernis Eo-n en 1984 per kursoj de KCE, en 1989 aliĝis al SES kaj UEA. En 2003 ŝi organizis la jubilean SES-tagon en Bazelo. Aliaj fidelaj membroj de la bazela ES estas Guido APPIUS, Carlo NICOLODI, ges-roj SENN, k.a.

## Bazela kantono

Ne nur en la urbo, sed ankaŭ en *Basel-Landschaft* estis faritaj klopodoj por disvastigi Eon. En 1909 Jakob SCHMID el Berno prelegis en la urbetoj Liestal kaj Sissach. Laŭ informo en *Vespera Horo*, en 1910 estis starigita EG Liestal kaj la 14-an de septembro 1911 okazis la fondo de EG Sissach sub la prezido de Charlotte PULVER el Bazelo. *Svisa Espero* raportis en 1912, ke en la vilaĝo Gelterkinden prelegis Jakob SCHMID antaŭ 80 personoj kaj ke PULVER komencis Eo-kurson kun 26 anoj.

Andy KÜNZLI.

-oOo-

# Pri la festa jubilea tago

# Sabaton 27-an de septembro 2003

## La jubilea programo pli kaj pli preciziĝas

Videble ni ne jubileos tute solaj, enfermitaj en nia esperantuja mondeto.

**En Lausanne la urbestro Daniel Brélaz renkontos nin ĉe la hotelo de la kastelo de Ouchy por salute inaŭguri nian festotagon.**

Tial ni esperas, ke multnombre alkuros la samideanoj el tuta Svislando kaj eĉ el aliaj landoj por ĉeesti tiun ĉi eventon, kiu okazos inter la 10h15 kaj la 10h45.

Kaj kiam je la 10h45 ni ekpaŝos al la ŝipo veturonta al Rolle, **tiam muzikisto altiros la atenton de la publiko**, por ke ĉiu eksciu, ke la festantoj parolas esperanton.

Ni kontaktas nuntempe la prezidanton de Rolle kun la espero, ke ankaŭ en la urbo, kie fondiĝis SES, reprezentanto de la lokaj aŭtoritatoj kunjubileos.

**Ĝenerala programo de la festotago jam aperis en la pasinta numero marta-aprila de nia bulteno.** Kiam ĉio estos detale

precizigita, tiam ni dissendos ĝeneralan informilon kun aliĝilo kun la espero, ke multaj anoncos sian partoprenon al la sabato 27-a de septembro.

Por vin instigi jam pretigi vian vekhorloĝon, por ne maltrafi la trajnon al Lausanne, jam nun ni publikigas konvenan trajnhoraron.

## Forveturhoroj por akurate alveni en Ouchy

**Aarau (via Biel): 7h35** – Alveno Lausanne: 9h33
**Basel: 7h24** - alveno Lausanne: 9h33
**Bern: 8h47** - alveno Lausanne: 9h54
**Biel: 8h35** - alveno Lausanne: 9h33
**La Chaux-de-Fonds: 8h16** – Lausanne: 9h33
**Fribourg: 9h09** - alveno Lausanne: 9h54
**Genève: 9h18** - alveno Lausanne: 9h57
**Luzern (via Olten): 6h54** – Lausanne: 9h33
**Neuchâtel: 8h52** - alveno Lausanne: 9h33
**Olten (via Biel):7h47** - alveno Lausanne: 9h33
**St.Gallen (via Bern): 6h11** – Lausanne: **9h54**
**Sion: 8h59** - alveno Lausanne: 10h00
**Solothurn: 9h11** - alveno Lausanne: 10h33
**Thun (via Bern): 8h18** - alveno Lausanne: 9h54
Vevey: 9h46 - alveno Lausanne: 10h00
Winterthur (via Bern): 6h58. – Lausanne: 9h54
**Yverdon: 9h12** - alveno Lausanne: 9h33
**Zürich (via Bern):** 7h34 - alveno Lausanne: 9h54

Kaj ĉiuj komprenu, ke SES bezonas monrimedojn por jubilee aŭdigi la voĉon de esperanto. Do malavare utiligu la SES-pagilon por donaco favora al la jubileaj aranĝoj, indikante la celon **"Agado 2003"** aŭ **"Jubileo"**

## Ĉiuj Laŭzanen je la 27-a de septembro!

## Jubilea semajno

**Ni rememorigas, ke jubilea fest-semajno ĉirkaŭos la jubilean tagon. Kiel jam anoncite, ĝi disvolviĝos en La Chaux-de-Fonds de la 26-a de septembro ĝis la 2-a de oktobro.**

La programon de tiu ĉi aranĝo vi jam povis legi en la marta-aprila numero de nia bulteno. Ankaŭ ĉiuj baldaŭ ricevos la detalan programon de tiu aranĝo kun aliĝilo.

## Multaj kunjubileu en la neŭŝatela montaro!

## Pretiĝu salutvortoj!

Kaj espereble, en ĉiu loka grupo, faka asocio, amika rondo, pretiĝas la sprita rakonteto, kiun la societa re-prezentanto prononcos je la momento de la salutvortoj fine de la tagmanĝo en Rolle!

# Tutsvisa aktiveco

# CDELI


Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
& 032 967 68 55.
Fakso: 032 967 68 29, indiki: por CDELI.
Retadresoj: CDELI.VCH@ne.ch
martine.schneller@ne.ch
claude.gacond@ne.ch
nancy.fontannaz@ne.ch


## Studsabatoj
### didaktikaj ĉe CDELI

Sub la gvido de Claude GACOND, Nancy FONTANNAZ kaj Stefano KELLER didaktikaj stud-sabatoj okazantaj preskaŭ ĉiumonate ĉe CDELI alportas utilan helpon al la lernantoj kaj instruantoj de esperanto. Tial ilia frekventado estas konsilinda al ĉiuj studemuloj. Kiu volas progresi en la praktiko de esperanto, tiu rezervu la sekvajn sabatojn: **maje 24: Ed BORSBOOM el Utrecht prelegos pri la kaŝita vivo de Andreo CSEH, la mezuloj studos kun Monika Molnar kaj la komencantoj kun Stefano KELLER. (Atentu pri la ŝanĝo de la dato de la maja studsabato), junie 21 kun Claude Gacond, Stefano Keller kaj Nancy Fontannaz, oktobre 18, novembre 15.**

Por minimuma kovro de la elspezoj estas petata partoprenkotizo de F 10.- Senpage por JES-anoj. (Maje estos petata partoprenkotizo de F 20.- al la aŭskultantoj de Ed Borsboom.)

### Aliĝo

Por faciligi la organizon de la aranĝo la partoprenontoj bonvolu ĉiam letere, rete aŭ telefone anonci sian aliĝon al Claude GACOND: Esperanto, CP 5031, 2305 La Chaux-de-Fonds 5. Rete: gacond@bluewin.ch. Telefone: 032 926 52 32 aŭ 032 967 68 55.

### Horaro

**9h30: Malfermo de la CDELI-salono:** eblo aĉeti brokantajn kaj novajn librojn.
**11h00: Oficiala malfermo** kaj formiĝo de la stud-grupoj. 11h45: Kafuma paŭzo. **12h00: 2-a stud-periodo.** 12h45: Kuna iro al la najbara italeca restoracio Ital'Panini, Serre 25, por la komuna tagmanĝo. **14h30: 3-a stud-periodo.** 15h15: Teuma paŭzo. **15h30: 4-a stud-periodo.** **16h15: Konkludo de la renkonto** en la CDELI-salono, kie eblas resti por teumi, babili, akiri librojn ĝis la propra forirmomento. **17h30: Oficiala fermo.**

### Enirejo al la CDELI-salono

3-a pordo nord-orienta de la biblioteka domo, kiu estas ŝlosita sabate. Alvenantoj premu la sonorilan butonon, kiu troviĝas maldekstre de tiu pordo, kaj iu tuj venos.

### Por atingi la bibliotekon

**El la stacidomo:** La biblioteko situas ĉe la strato Progrès N° 33. El la stacidomo ĝi atingeblas per la buslinio 4, direkto "Hôpital". Bileto akireblas en la buso mem. Petu la haltejon "Bibliothèque".
**Aŭtomobile:** Aŭtomobilantoj ne parku sian veturilon en la biblioteka korto, sed en la najbaraj stratoj. Ekde la urba enirejo videblas indikiloj konduke al la biblioteko.

# Raporto

La marta studa sabato grupigis 22 studemulojn sub la gvido de Monika MOLNAR kaj Stefano KELLER. Fakte montriĝis la neceso formi tri grupojn kaj trovi rimedon por bone orienti la novulojn al grupo konvenanta al ilia lingvo-nivelo. La libro-servo vekis la aĉetemon de multaj.

Claude GACOND

## Historia raporto pri CDELI

En la franca estas nun verkita 36-paĝa historia raporto pri CDELI, kiu estas aĉetebla je la prezo de F 5.-, sendokostoj inkluditaj. Interesatoj esprimu sian deziron ricevi tiun ĉi dokumenton.

# ILEI

## Svisa Sekcio

Mireille GROSJEAN
CP, 2416 Les Brenets.
mireille.grosjean@rpn.ch

# Protokolo de la Ĝenerala Asembleo

### Basel, 5an de aprilo

**Ĉeestantoj:** 9 personoj: Nicole BEROUD, Nancy FONTANNAZ, Claude GACOND, Mireille GROSJEAN, Nicole MARGOT, François RANDIN Christiane SIXTUS POT, Jean-Thierry VON BÜREN, Dietrich WEIDMANN.

Senkulpigito: Alain FAVRE.

**Observanto:** Bruno GRAF, prezidanto de SES

**Kursoj :**

En Genève okazas 2 kursoj en la popoluniversitato kaj 2 konversaciaj rondoj.

Okazas senpaga kurso en Lausanne.

Okazas tre vigla partopreno dum la studsabatoj de Claude GACOND ĉe CDELI en La Chaux-de-Fonds.

Okazas kursoj en kelkaj lokoj dum renkontiĝoj.

La tiama taskigo de KCE nome de SES fari svisajn ekzamenojn venas kiel temo, ĉar la afero estis traktita dum Ĝenerala Asembleo de KCE. Nicole MARGOT estis tie kaj raportas. Tiu taskigo estis en la tempo, kiam Claude GACOND agadis ĉe KCE. KCE klopodas starigi novan regularon pri svisaj ekzamenoj. Neniam venis raporto de KCE al SES. Mireille GROSJEAN proponas, ke SES ĉesu tiun taskigon, reprenu la decidpovon kaj rezignu pri svisaj ekzamenoj, ĉar la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA estas tre konvenaj. Tion ni povus okazigi en Svislando, ĉar ni havas du rajtigitajn ekzamenantojn: Claude GACOND kaj Mireille GROSJEAN. Mankas unu, ĉar la stabo devas esti tri-opa. Alia kunlaboro eblus kun SIS.

Bruno GRAF proponas, ke Nicole MARGOT kaj Mireille GROSJEAN pri-studu la aferon. Poste la diskuto iros al la estraro de SES, kaj venontjare al la Ĝenerala Asembleo de SES.

François RANDIN.

# Membraro de ILEI-Svislando

Svisa ILEI-Sekcio konsistas el 16 membroj: Nicole BEROUD-FOCKE, Basel; Lucien DAHAN, Genève; Lucienne DOVAT, Renens, Alain FAVRE kaj Nicole MARGOT, Lausanne; Nancy FONTANNAZ, Pully; Jean-Noël FRIOT, Satigny; Claude Gacond, La Chaux-de-Fonds; Mireille GROSJEAN, Les Brenets; Renate HERR, Bern; Jean-Jacques LAVANCHY, La Tour-de-Peilz; Claude PIRON, Gland; François RANDIN, Lausanne; Christiane SIXTUS POT, Perly; Jean-Thierry VON BÜREN, Savagnier; Dietrich WEIDMANN, Zürich.

# JES

**junularo esperanta svislanda**


Postfach 3324, 4002 Basel

Telefon-numero: 061 301 2705

info@jesperanto.ch

www.jesperanto.ch


Prezidanto. Benno FRAUCHIGER

Sekretario: Joëlle GROSJEAN

## Kunvenprogramo

**Maje 17:** Printempa Tago de JES.

**Julie 19-26:** 59-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Lesjöfors, (SE).

**Oktobre 25:** Ĝenerala Asembleo de JES.

# KCE

Kultura Centro Esperantista


Strato Postiers 27, Poŝtfako 311

2301 La Chaux-de-Fonds.

& kaj fakso: (032) 926 74 07.

kce.esperanto@bluewin.ch


## Raporto

Dum la Asembleo kunveninta la 29-an de marto elektiĝis nova direkta komitato, kiu konsistas el Daniel MUHLEMANN kiel prezidanto, Perla MARTINELLI kiel vicprezidanto kaj Dieter Rooke kiel sekretario.

KCE reakiris gastejan dimension kun dekkvino da komfortaj tranoktebloj.

Interesatoj petu la detalan informilon.

## Programo

**Maje 24-25:** Socia Esperanto-Forumo: kiaj perspektivoj en Eŭropo? Enkondukos Kristian GARINO, aktivulo en Florenco, federalisto.

**Julie 5-12:** Grindelvalda Naturarmika Semajno, antaŭkongresa aranĝo al la SAT-Kongreso. Gvidos Francisko DEGOUL

# SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud EGGENBERGER, Wurmbühlstr. 10
8405 Winterthur & 052 233 47 64
gertrud.eggenberger@bluewin.ch

## 40-a GERI

### Gaja Esperanto-Rondo Instruiteca (GERI)

Gaja Esperanto-Rondo Instruiteca (GERI) – organizata de SAEF, sub la diligenta kaj ĉarma gvido de Gertrud EGGENBERGER kaj Ernst GLÄTTLI, estas bone konata inter la svisa esperantistaro kiel regula, nemaltrafebla evento.

La jubilea 40-a GERI de la 15-a de marto en Zentrum Dreilinden en Rotkreuz estis aparte speciala. 15 GERI-amikoj kune festis la jubileon en amikeca kaj gaja rondo, dorlotitaj de SAEF per pluraj surprizoj, interplektitaj en la lingvoekzercoj. Interŝanĝoj de gratuloj kaj donacoj substrekis la jubilean etoson.

Per enkondukaj vortoj Gertrud EGGENBERGER skizis la historion de GERI, kiu komenciĝis en Lucerno, dum iom da tempo okazis en Olten, revenis al Lucerno kaj nun trovas regulan kunvenejon en Rotkreuz. Ŝi rakontas:

*"La unuan kvazaŭ GERI-on Otto WALDER kaj mi aranĝis la 3-an de oktobro 1981 sub la nomo "Renkontiĝo kun novaj, freŝaj kaj eternaj gekomencantoj".*

*En la invitilo al tiu unua renkontiĝo oni povas legi "Se vi konas esperantiston, kiu pro izoliteco ĝis nun restis 'eterna komencanto', bonvolu atentigi lin aŭ ŝin pri tiu ĉi aranĝo."*

*Fakte ne multo ŝanĝiĝis de post tiam, nur la nombro de partoprenantoj kreskis kaj veraj komencantoj tute ne plu estas, t.e. la iamaj komencantoj nun estas spertuloj."*

Nu, tiom spertaj ni ne estas, ke GERI estonte ne plu necesos. Kontraŭe la GERI-geamikoj jam antaŭĝojas **la proksiman renkontiĝon je la 15-a de novembro 2003**.

Ĉiuj partoprenintoj al GERI esprimas siajn grandan dankon kaj estimon al la kreintoj, kaj speciale al Gertrud EGGENBERGER kaj Ernst GLÄTTLI, pro ties fidela dediĉemo al GERI kaj pro la multaj feliĉaj horoj pasigitaj en tiu rondo. Vivu GERI!

Sonja BRUN

-oOo-

# UEA

## Ĉefdelegito en Svislando


François RANDIN
Av. de Chailly 10, CP 115,
1000 Lausanne 12.
Tel. 076 411 14 55, fakso 021 657 14 56.

Kiel kutime, paralele al la Universala Kongreso, okazos en Gotenburgo aparta internacia aranĝo por infanoj. Jam aliĝis al tiu Internacia Infana Kongreseto infanoj el Francio, Hungario, Kubo, Norvegio, Rumanio kaj Svedio. Esppereble ankaŭ Svislando havos reprezentanton. Petu la necesan informilon pri tiu ĉi kongreseto kaj pri la Universala Kongreso al François RANDIN.

# Radio

La lundon 28-an de aprilo je la 08h20 ĉe la 3-a kanalo de la Svisa Alemana Radio DRS3 aŭdiĝis intervjuo pri esperanto kun Dietrich WEIDMANN. Registraĵo de tiu ĉi elsendo estas deponita ĉe CDELI.

-oOo-



# Loka vivo

# Basel

Esperanto-Societo Basel
PF 103, 4005 Basel, & 0049 76 214 57 12
Kunvenoj: 20h00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

## Raporto

**Ĉina fonduo:** La 27-an de februaro la grupanoj renkontiĝis ĉe ges-roj SENN en gaja rondo por frandi bongustan ĉinan fonduon kun multaj diversaj saŭcoj kaj legomoj. Sed unue enkonduke diskutiĝis la planado de la Trilanda renkontiĝo aprila. Kaj post la fonduo bonega glaciaĵo konkludis la bankedon. Vere agrablega vespero estis tiu renkonto ĉe la amikoj SENN.

## Venontaj kunvenoj

**Maje 22:** Minigolfo en "Grün Renkontiĝo je la 19h00 apud la restoracio. Post la ludo agrabla babilado sur la teraso de la restoracio.80".

**Junie 21:** Komuna esplorado de Kaiserstuhl kun Esperanto Freiburg kaj Gérarmer. Renkontiĝo je la 10h00 ĉe la stacidomo de Breisach. Detala programo havebla ĉe Ursula NIESERT: Ursula.Niesert@esperanto.de

**26:** Invito ĉe Berthe SPALINGER je la 19h00. Aliĝo ĝis la 23-a de junio.

**Aŭguste 24:** Ekskurso.

**Septembre 25:** Ĉiu rakontas pri siaj ferioj.

**Oktobre 23:** Invito ĉe la familio BEROUD-FOCKE.

**Novembre 27:** Programo 2004.

# Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Espéranto-infos: & 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio *«Aux Cheminots»*, 7, rue des Gares, Genève. Komuna vespermanĝo ekde la 19-a horo.

## Raporto

La Ĝeneralan kunvenon je la 4-a de marto partoprenis 14 stelanoj. Andres BICKEL estis elektita tag-prezidanto kaj Lucien DAHAN protokolanto. La tagordo, protokolo kaj librotenado estis unuanime aprobitaj, kaj Patrick PERREARD kaj Lucien DAHAN elektitaj kiel kas-kontrolantoj, Gilda PACE kaj Eva VISCHER reelektitaj kiel kasisto kaj bibliotekisto. Krom tio decidiĝis, ke la grupo restos kolektive gvidata kiel dum la pasintaj jaroj.

Arlette DI VETTA kun la apogo de la aliaj grupanoj esprimis la deziron ricevi informon pri la strukturo de la svisa esperanto-movado. Armand COTTON raportis pri la vendo de brokantaj libroj kaj Camille kaj Andres BICKEL invitis la venontan ĝeneralan kunvenon al sia loĝejo.

La kunvenon de la 1-a de aprilo partoprenis 11 stelanoj.

## Venontaj kunvenoj

**Junie 3:** Kiel la svisa Esperantio strukturiĝas, kun Bruno GRAF, la prezidanto de SES.

**Julie 12 sabate** je la 15-a horo sur Insulo Rousseau. (Se pluvos: en la restoracio Le Lacustre.)

**Aŭguste 16°sabate** je la 15-a horo sur Insulo Rousseau. (Se pluvos: en la restoracio Le Lacustre.)

Konversacia kurso kun Claude PIRON la ĵaŭdon de la 12-a horo ĝis la 13-a, ĉe Maison du quartier, Plainpalais, 1 rue de la Tour.

Esperanto-babilado la lundon ekde la 18a horo 30, ĉe Restoracio Les Cheminots, rue des Gares 7.

-oOo-

# Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo
Case postale 389, 1009 PULLY
&: 021 729 58 02
<esperanto@isuisse.com>
<http://www.esperanto.ch>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00.

Diskuta rondo: ĉiun trian lundon kun François RANDIN, en Chailly-Lausanne. Bonvolu telefone voki lin antaŭe 076 411 14 55.

## Venontaj kunvenoj

**Junie 06**: Denove ni kantos.
**Septembre 27**: Jubilea festo.

# Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
& 041 280 46 12.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg.)

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - konversacia rondo de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz BRÜGGER en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

## Raporto

Antaŭ tri jaroj Paul SCHERER faris la unuajn paŝojn por provi aperigi artikolon pri esperanto en la organo *Sprachspiegel* de SVDS (Schweizerischer Verein für die deutsche Sprache), kies membro li estas jam de multaj jaroj. En la personoj de Bruno GRAF kaj Andy KÜNZLI li trovis la verkistojn. La redaktisto de Sprachspiegel kunfandis kaj mallongigis la du verkojn. La rezulto nun aperis en la numero 2003-2 (aprilo) sur la paĝoj 60-63-aj. Antaŭ la presado Paul SCHERER ricevis la eblon aktualigi la datojn.

Tre bona estas tiu 4-paĝa artikolo titolita *Esperanto – "Die Sprache der Hoffnung"*.

## Venontaj kunvenoj

**Konversacia rondo** de la 14-a horo ĝis la 16-a kun Franz BRÜCKER en restoracio Simplon la 2-an de julio, 3-an de septembro, 5-an de novembro kaj 7-an de januaro 2004.

**Kunvenoj:**

**Junie 4:** 14h00: Konversacio kun Franz BRÜCKER; 14h30: Pri la insuloj de Brisago kun Annelies DETTLING.

**Aŭguste 9:** Ekskurso anoncota.

**Oktobre 1:** 14h00: Konversacio kun Franz BRÜGGER; 14h30: Distraĵoj kun Paul SCHERER.

**Decembre 3:** Zamenhofa festo. 14h00: El la verkaro de Zamenhof kun Paul SCHERER; 14h30: Kompilado de la programo 2004.

# Kantono de Neuchâtel

## La Chaux-de-Fonds

### Studaj rondoj ĉe CDELI

Dum la lastaj vesperoj ĉiuj alportis kaj klarigis ludojn. Tio kreis tre agrablan paroligan etoson.

**Datoj notindaj en via agendo: Maje 20, junie 03 kaj 17, septembre 2 kaj 16, oktobre 21, novembre 4 kaj 25, decembre 9.**

Eniro en la CDELI-salonon eblas ekde la 19h45. **Studo de la 20h00 ĝis la 21h45.** Fermo de la salono je la 22h00. Alvenantoj premu la sonorilan butonon, kiu troviĝas maldekstre de la enirpordo al CDELI. (Nord-orienta pordo de la Biblioteka Domo).

Claude GACOND.

# Wil

## Esperanto-Klubo Wil

Prezidanto: Stanislaw POCHANKE, Lettenstrasse 70, 9500 Wil. & 071 911 68 30.
Vicprezidanto: Verena CHAVES-WALDER, Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil. & 071 393 41 49.
Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Säntisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

## Venontaj kunvenoj

**Junie 04:** Prelego de T. WADOLOWSKA el Pollando.
**Julie 02:** Promeno al Dreibrunnen gvidata de B. POCHANKE.
**Aŭguste 10 (dimanĉe):** Tuttaga ekskurso al Bergli Fuchsacker. Renkontiĝo ĉe la stacidomo Flawil je la 09h30. Informoj riceveblaj ĉe Verena CHAVES-WALDER. Tel. 071 393 41 49.
**Septembre 03:** Prelego pri la temo "Survoje al la morto" de L. SIEGRIEST.
**Oktobre 01:** Raportoj kaj impresoj pri esperanto-kongresoj en 2003.
**Novembre 05:** Temo elektota.
**Decembre 03:** Adventa vespero kun V. CHAVES-WALDER, B. POCHANKE kaj L. SENNHAUSER.

# Zürich

## Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 ZÜRICH
& 01 251 50 25 <info@esperanto.ch>
Kunvenoj regule la duan sabaton de la monato matene je la 11h00 kun komuna manĝo en la klub-sidejo Esperantejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich-Seefeld.

## Raporto

Jan-Stanislaw SKORUPSKI rete tiel disinformadis:

*La 12-an kaj la 13-an de aprilo mi koncertis en Teatro STOK en Zürich, jes esperante ankaŭ. Kaj kiam mi demandis la publikon "Kiu de vi parolas esperante?" kaj neniu respondis, eksplodis ridego. Poste kelkaj junuloj demandis min pri la ebleco lerni esperanton. Mi respondis: "Ne lernu, ĉar kiam vi eniros la sekton, mi perdos publikon, mia aŭskultantaro*

*estas ĉiam neesperantista" – denove eksplodis ridego.*

Kaj por plendi, ke esperantuje oni ne legas liajn librojn, Jan-Stanislaw SKORUPSKI tiel sonetumis:

**Soneto por la Tago de Libro**

la esperanta fenomeno
funkcias sen esperantistoj
eĉ pli vaste kiam artistoj
esperante ludas sur sceno

demando "ĉu iu parolas…"
tuj venas eksploda ridego
neniu – laŭdo ĉu hontego
publiko diskrete petolas

simile aspektas legado
ĉar miajn librojn esperantajn
ne legas esperant-brigado

se mi morgaŭ skribus latine
mi konas legantojn amantajn
ili librojn legus rutine

Zuriko, la 23-an de aprilo 2003

Dieter Rooke informis, ke pro la surstrataj tumultoj kaŭzataj de la "nigra bloko" en Zürich, li migrigis sian surtratan agadon poresperantan de la unua de majo al Basel, kie li mendis standon por IKEK.

# Venontaj kunvenoj

**De la ĵaŭdo 29-a ĝis la dimanĉo 1-a de junio: Internacia Seminario pri 100 jaroj bahaa religio kaj esperanto-movado en Svislando.**
(Vidu la aldonitan informilon, en kiu vi trovos la aliĝilon).

Resuma programo:

**Ĵaŭdon 29-an:**
14h00-15h00: Alveno.
15h00: Malfermo.
16h15-18h00: Unua laborrondo: Tekstoj en la sanktaj skriboj de la bahaanoj pri universala lingvo ĝenerale kaj pri esperanto specife.
16h30: Komuna vespermanĝo.
20h00: La bahaa koruso de Zürich prezentas spiritajn kaj aliajn kantojn el la tuta mondo en esperanto kaj en aliaj lingvoj.
**Vendredon 30-an:**
09h00-10h15: Dua laborrondo: La religia sinteno ĉe L. L. ZAMENHOF, Lidja ZAMENHOF kaj Marta RUTH. Iliaj vizitoj en Svislando.
10h45-12h15: Kontaktoj de PRIVAT, FOREL kaj BOREL kun Lidja ZAMENHOF kaj Marta RUTH kaj aktivecoj de Fritz SEMMLE en orienta Svislando.
12h30-14h00: Komuna tagmanĝo.
14h00-18h00: Vizito de zurikaj lokoj signifaj por la esperanto-historio.
18h30-20h00: Komuna vespermanĝo.
20h00: Spektakla vespero: Orientalaj dancoj kaj prezento far Jan Stanislav SKORUPSKI de kantitaj sonetoj.
**Sabaton 31-an:**
09h00-120h15: Kvara laborrondo: Komunaj trajtoj inter la baĥaa kaj esperanta movadoj.
10h45-12h15: Kvina laborrondo: La esencaj diferencoj inter la bahaa kaj esperanta movadoj.
12h30-14h00: Komuna tagmanĝo.
14h00-15h30: Sesa laborrondo: La ektivecoj de la bahaanoj en la esperanto-movado kaj la aktivecoj de la esperantistoj en la bahaa movado.

16h00-18h00: Sepa laborrondo: Konkludoj: Kion bahaanoj kaj esperantistoj povas komune fari por siaj celoj, kia kunlaboro eblas, eventualaj kunlaboraj limoj.
18h30-20h00: Fondua vespero.
20h00: Spektaklo kun dancoj el Latinameriko kaj prezento far István MOROCZ de la lirika programeto "Paĉjo" pri la granda majstro Julio BAGHY.

**Dimanĉon 1-an de junio:**

09h30-13h00: Matenmanĝega lunĉo kun paralela konkluda debato pri la seminario.
13h00-14h00: Adiaŭado.

**Loko: Esperanto-Librejo,** Akazienstrasse 6, 8034 Zürich.

Dietrich M. WEIDMANN.
www.esperanto.ch/kalendaro

**Junie sabate 14:** 11h00-13h00: Konversacia rondo kaj komuna matenmanĝego. Kontribuo al la manĝo: F 10.-

21-22 (sabate-dimanĉe: 10h00-17h00: Semajnfina intensivkurso por komencantoj / Wochenendintensivkurs für Anfänger. Kursokosto F 150.-

# Morto

## Walter GIANNINI-AEPPLI

**Mainz 11.04.1914 – Zollikerberg 9.04.2003**

Walter GIANNINI estis filo de svisaj gepatroj vivantaj en eksterlando. Lia familio originas el Quinto/TI.

Li naskiĝis en Mainz la 11-an de aprilo 1914 kaj studis muzikon en tiu ĉi germana urbo. Li estis idealisto kun sociaj priokupoj, adepto de la liberekonomia doktrino de Silvio GESELL (1862-1930) kaj de la vivoreformo proponita de Werner ZIMMERMANN.

En 1931 li aliĝis al la alternativa ĝardenkonstrua kolonio Schurrenhof en Donzdorf en Virtembergo (Germanio). Sed baldaŭ pro unu el siaj kritikaj artikoloj kontraŭ la hitlera reĝimo aperinta en svisa gazeto, li estis kondamnita je malliberiĝo. Tial poste dank'al sia duobla ŝtataneco en 1934 li transloĝiĝis al Svislando, kie li daŭrigis sian priagrikulturan instruiĝon en la lernejo por biologia terkultivado en Ebmatingen (ZH) kaj poste servis kiel kamplaboristo en Maur (ZH).

En 1939 Walter GIANNINI ĉesis aktivi agrikulture por lerni en Zürich la profesion de flegisto por psike kaj anime malsanaj homoj kaj dum la milito en la jaro 1942 li laboris en Francio serve al porinfana kolonio gvidata de Svisa

Ruĝa Kruco. Tie li savis du judojn el la persekuto far la nazia polico.

Reveninta en Svislando en 1943 Walter GIANNINI rededicis sin al la muziko. Li studis en la zurika konservatorio ĉe Ernst HÖRLER, kies posteulo li fariĝis. Kaj li kunlaboris ankaŭ kun la zurika bekfluta pioniro Rudolf SCHOCH, kaj kontribuis al la populariĝo de la muzikinstruado kaj de la ĥorkantado. Krome li iniciatis kunfondon kaj administradon de Svisa Laborkomunumo por Junulara Muziko kaj Muzikedukado (SAJM), asocio kun 1500 membroj, kies oficialan bultenon li prizorgis.

Kiel liberpensulo li anis en la politika partio Landesring der Unabhängigen (LdU).

Walter GIANNINI lernis esperanton en 1921 en Mainz pere de Adam HUND. Tiam li estis sepjara knabo. Kaj ekde tiam li aktivis en la esperanto-movado. En la kvindekaj jaroj li sponsoris la titolpaĝon de *La Juna Voĉo*, la bulteno de Esperanto-Junularo de Svislando, kaj en 1958 li partoprenis al la fondo de Esperanto-Edukistaro de Svislando. Li estis ano de SES, de UEA, de KELI (1965) kaj de Zurika Esperanto-Societo, kiun li prezidis.

Oni povas diri, ke li restis malavara esperantisto ĝis sia morto je la 9-a de aprilo ĉijara. Pri tio atestas lia nomo en la ĉinumera rubriko Donacoj al SES.

Claude GACOND & Andy KÜNZLI.

# Libroj

## Elreviĝo

### Weltsprachenwörterbuch

**Deutsch-Esperanto**
**Esperanto-Deutsch**

lic. phil. Dietrich M. WEIDMANN
Zürich, Allsprachendienst Weimann's Mondo-Servo, Februar 2003. 168p.

Kun antaŭĝojo jam ekde baldaŭ du jaroj mi atendadis pli kaj pli senpacience la vortaron ***"deutsch-esperanto kaj esperanto-deutsch"***, kiun Dietrich WEIDMANN anoncadis, kiel certe pli riĉan kaj pli fidindan, ol ĝiaj antaŭuloj. Vere reale mankas leksikono, kies aĉeton oni povas konsili al esperanto-lernanto germanlingva.

Sed ho ve! La unua impreso, kiun mi ricevis trafoliumante la novan

vortaron ***Weltsprachenwörterbuch***, estas bedaŭrinde elreviga.

Mi reagas ne kiel leksikologo, sed kiel didaktikisto. Kiun vortaron konsili al lernanto? Jen mia simpla demando pli kaj pli aktuala, kiam ni laboras al la revigligo de la ***Perkoresponda kurso por la germanlingvanoj***.

Ĝis nun al la komencantoj mi simple konsilis unue akiri la tre modestan ***Wörterbuch deutsch-esperanto*** kaj ***esperanto-deutsch***, kiun eldonis la viena Österreichische Esperanto-Bewegung, antaŭ ol proponi la aĉeton de ***PIV***. Tiu ĉi situacio ja ne estas tre kontentiga, kompare al la ebloj proponataj al la franclingvanoj. Tial miaj rigardoj estis turnitaj kun granda espero al la verko de Dietrich WEIDMANN.

Nenion mi kapablas diri koncerne al la germana lingvo mem. Sed pri la esperanta mi certe rajtas esprimi kelkajn vidpunktojn.

Unue la antaŭparolo de la vortaro vekis mian legemon. En la unua linio de la unua frazo fiksis mian atenton la stranga vorto "**100-jariĝio**". Ĉu novismo?

Tial mi tuj serĉis la vorton **jariĝio** por malkovri ties germanlingvan ekvivalenton. Kaj koncerne al la vortelemento "**jar**" mi unue trovis:

**jar¦a** > järlich; **~cento** > Jahrhundert s.; **~deko** > Jahrzehnt s

Mirige la lasta "s.", kiu estas mallongigo de "sächlich" aŭ "neŭtra genro" aperas sen punkto. Kaj mi konstatis, ke la liston de la jar-vortoj strange interrompas la indiko:

**jardo** > Yard s.

Poste revenas la sekvaj **jar**-vortoj:

**jar¦finbilanco** > Jahresabschluss m.; **~finfesto** > Silvester m.; **~kolekto** > Jahrgang m., Jahreskollektion w.; **~libro** > Jahrbuch s.; **~milo** > Jahrtausend s.; **~ o** > Jahr s.

Tiu ĉi unua esploro konvinkis min, ke la vorto **jariĝio** neniel estas novismo, sed nura tajperaro, kiel ankaŭ la manko de punkto post la "s" de "Jahrzehnt".

Tiu ĉi malkovro maltrankviligis mian trafoliuman esploron, kiu hazarde direktis min al la vortsekvo:

**cit¦aĵo** > Zitat s.
**cit¦elo** > Eimer m.
**cit¦i** > anführen; ~zitieren
**cito¦logia** >zytologisch
**cito¦plasmo** > Zytoplasma s.

Mi unue komencis miri pri la reala rolo de la vertikala linieto "¦", kiun antaŭe mi ne trovis ĉe **jardo** kaj nun trovas ĉe **cit¦elo**, vorto, kiun mi neniam renkontis ĝis nun. Ĝi ŝajnas esti konstruita per la kombino de la elementoj **cit** kaj **elo**.

Mia esploremo do kondukis min al la trovo de tiu mistera elemento **el**. Mi nur malkovris la prefikson *el-* kaj prepozicion **el**:

*el- > Präfix mit der Bedeutung "aus"*
**el** > aus (prep.); ~- > aus- (pref); **~kio** > Woraus; **~malantaŭ** > herfor, **~tio** > daraus

Post sufiĉe longa cerbumo mi decidis ekzameni en la germana

parto de la libro la vorton "Eimer", kaj mi trovis:

**Eimer m.** > citelo

Ĝis nun laŭ mia elementa kono de la germana lingvo mi kredis, ke la vorto "Eimer" pli malpli egalas al la esperanta "sitelo" kaj ke tial ĝi povas ludi la rolon de nepreciza mezurunuo.

Sed nun mi malkovris, ke ĝi eble havas tute alian signifon, kaj mi do esploris en la nova ***PIV*** la realan signifon de tiu al mi nekonata vorto **citelo**. Mi baldaŭ malkovris, ke ĝi tutcerte ne ekzistas en esperanto, kaj tiam komprenis, ke la WEIDMANN'a **citelo** au **cit¦elo** estas nur misformo de la vorto **sitelo**, kies reala formo fakte ne troveblas en la nova ***Weltsprachenwörterbuch***.

Mi ankaŭ komprenis, ke la vertikala "¦" estas tajperaro, kiel ĝia manko en aliaj vortoj, kiel ĉe la jam citita **jardo**, aŭ ke ĝi povas esti fuŝinforma, kiel en la vortoj **cito¦logia** kaj **cito¦plasmo.**

Laŭ la nova ***PIV*** **citolog/o** estas "specialisto pri citolog/io. Scienco pri la strukturo kaj funkciado de la ĉeloj. Sinonimo estas ĉel-ologio. Do en la vorto **citologia** la vertikala "¦" devus almenaŭ troviĝi inter la vortelementoj **cit** kaj **ologia**, kvankam tio estus absurda. Ĉe **cito¦plasmo**, kiu laŭ ***PIV*** sinonimas al ĉel-plasmo, tiu divido povus esti akceptebla. Ekzameno en ***PIV*** de la baza vorto **plasm/o** montras, ke ambaŭ vortoj WEIDMANN'aj **cito¦logia** kaj **cito¦plasmo** estas leksike monstraj.

Mia rolo de didaktikisto estas konsili aŭ malkonsili stud-ilojn al lernantoj.


Pro la malkovro de tiuj fuŝoj kaj baldaŭ de centoj da aliaj, mi konvinkiĝis, ke la ***Weltsprachenwörterbuch***, eĉ se ĝi troviĝos en la stoko de la libroj aĉeteblaj ĉe la libro-servo de Esperanto perkoresponde ĉe CDELI, bedaŭrinde listiĝos inter la verkoj, kies akiro estos malkonsilata al esperanto-studanto.

Oni povas akcepti kelkajn mankojn ĉe vortaro, sed ne laŭ la abundo karakterizanta la leksikonon de Dietrich WEIDMANN.

Pro tio mi antaŭvidas, ke la recenzaj analizoj de tiu vortaro nur povos esti prave severaj.

Mi bedaŭrinde konkludas, ke honore al sia centjariĝo SES meritis libron malpli diletante verkitan.

Claude Gacond



# Kongresen

## Esperantumi en Bouresse

Inter la dekkvino da staĝoj proponitaj por 2003 en Esperanto-Centro Kvinpetalo, mi estis elektinta la "Paroligan kurson" de la 14-a ĝis la 18-a de aprilo. La trajno TGV ebligas travojaĝi Francion rapide kaj komforte. En la urbo Poitiers samideaninoj akceptas amike la trajne alvenantojn por veturigi al ili la tridek lastajn kilometrojn.

Kvinpetalo konsistas el aro da diversaj domoj kun ĝardenoj ĉirkaŭ tiu de Suzanne BOUROT, la animo de la Centro.

Samtempe okazis staĝo pri jogo gvidata de Arlette PLUTNIAK La tagordo ebligis al interesatoj partopreni en ambaŭ faradoj.

Mi tre ŝatis la paroligan kurson gvidatan de la kapabla kaj vivoplena Katalin KOVATS, kaj mi opinias, ke mi bone progresis.

Min plezurigis la amikeco, la pentrinda vilaĝo kaj ties loĝantoj, la senlima kamparo lumigita per la kolzaj kampoj. Printempo reĝis jam plene en la lando Poitou. Multegaj diversspecaj birdoj pepis tage; nokte kvakis ranoj ĝis la momento, kiam ekkantis najtingaloj…

Esperantumi en tia etoso, kia granda kontentiĝo!

André SANDOZ, La Chaux-de-Fonds

**80-a Germana Esperanto-Kongreso**
**6-9-aj de junio 2003, Kaufbeuren.**

Temo: Pligrandiĝanta Eŭropo ĉu muta koloso?

Ferstpreleganto: D-ro Renato Corsetti, prezidanto de UEA.

Petu la detalan informilon al Christian Darbellay, Kaiserstrasse 39, DE-24143 Kiel. Tel. 0431 73 77 88. gek@esperanto.de

Dieter ROOKE informis, ke al la IKEK-Konferenco, kiu disvolviĝos de la 23-a ĝis la 28-a de majo en Bankja apud Sofia en Bulgario, li partoprenos kun Carlo NICOLODI. Kiu ŝatus ricevi informojn pri tiu renkonto aŭ eĉ kunvojaĝi, tiu rekte rilatu kun li: Dieter ROOKE. Äussere Klus 14, 4702 Oensingen.